

### Ĉu estas esperanto nur lingvo?

Tre estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, karaj gesamideanoj!

Antaŭ kelka tempo alportis la tutmonda gazetaro la sciigon - kaj vi certe legis ĝin ankaŭ en via gazeto - ke oni malpermesis en Germanujo esperanton. Niaj esperantaj gazetoj kaj unuavice la Heroldo de Esperanto aperanta en Germanujo mem, klarigis la sensacian novaĵon kaj montriĝis, ke formale ne temis pri vera malpermeso: la kompetenta oficisto sciigas en sia dekreto, ke esperanto ne povas kaj ne povos esperi en la nuna Germanujo je kiu ajn oficiala subteno. Kion signifas tiu ĉi sciigo? Ĝi signifas, ke la kluboj aranĝantaj esperantajn kursojn ne plu povos instrui en lernejoj aŭ aliaj publikaj domoj, ĝi signifas, ke neniuj esperanta societo ricevos plu financon subtenon, kiel ekzemple ricevadis la Germana Esperanto-Instituto de la Germana Respubliko. Eble kelkiu diros: Tro multe da bruoj pro nenio. Ankaŭ en nia ŝtato kaj en la tuta cetera mondo ja estas la financa subteno de l'ŝtatoj al nia movado preskaŭ nulo.

Sed, amikoj, ni ne trompiĝu! Ne temas ja sole pri forpreno de avantaĝoj kaj financa subteno, temas ankaŭ kaj ĉefe pri la morala flanko de tiu ĉi dekreto. Ĝi klare montris, ke la oficialaj rondoj de la Tria Regno ne ŝatas esperanton kaj speciale nian movadon, kiu eliris kaj estas portata de neŭtrala kaj internacia lingvo. Ĉiu el vi komprenas, kion signifas tia malŝato de superaj instancoj en diktatora ŝtato. Kiu ŝtata oficisto, kiu instruisto aŭ profesoro kuraĝos labori por nia lingvo spite la oficialan malŝaton? Permesu, ke mi ilustru la sekvojn per unu sola ekzemplo. La Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj eldonas gazeton, nome la Internacian Pedagogian Revuon. Ĝia administracio antaŭ la diktatora reĝimo kaj redakcio estis - antaŭ la diktatora reĝimo - en Germanujo kaj nur en Saksujo ĝi havis kelkajn centojn da abonantoj. Post la proklamo de la Tria Regno la administracio kaj la redakcio transloĝiĝis al Nederlando kaj la revuo perdis preskaŭ ĉiujn siajn abonantojn en Germanujo.

Pensante je tiu ĉi dolora frapo, kiu trafis nian movadon en la nuna Germanujo, ni vole-nevole venas al la demando: Ĉu esperanto estas nur lingvo? Se ĝi estas nur lingvo, tiam la citita dekreto estas nekomprenebla. Aŭ ĉu tamen esperanto estas nur simbolo de ideo kontraŭa al la idearo reganta en la nuna Germanujo? Sinjorinoj kaj sinjoroj, la demando ne estas nova. Ĝi estas tiom aĝa kiom esperanto kaj nia movado mem. Per ĝi okupiĝis la unuaj esperanto-pioniroj, pri ĝi parolis Zamenhof preskaŭ en ĉiu sia kongresparolado. Tiun ĉi gravan demandon oficiale respondis la unua Universala Kongreso en Boulogne s.m. en la jaro 1905 per la konata Deklaracio pri Esperantismo. Ĝia unua paragrafo komenciĝas per tiuj ĉi vortoj: "La Esperantismo estas penado disvastiĝi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa" kaj la fino de la paragrafo: "...ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata". La lasta paragrafo de la Deklaracio tekstas: "Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas." Laŭ tiu ĉi Deklaracio esperanto estas - kiel ni vidas - oficiale nur lingvo. Estas klare, ke oni ne povis oficiale ligi la lingvon esperanto kun iu difinita filozofia mondkoncepto, ĉar nur la lingvo havas ŝancon, ke ĝi atingos la deziritan tutmondan disvastiĝon.

Jen la difino de l'Deklaracio. Sed ŝajnas al mi, ke estas grave kaj juste, ke ni demandu ankaŭ la kreinton de esperanto pri lia opinio. Zamenhof oficiale aprobis la Deklaracion, sed private li neniam rezignis pri la dua parto de sia idealo, kiu estis al li multe pli kara ol esperanto, ĉar la lingvo, ĝia tutmonda akcepto kaj disvastiĝo, ĝia praktika uzado kaj servado ne estis la celo de lia tutviva klopodado, al kiu li dediĉis ĉiujn siajn fortojn, sian genion, sed antaŭ ĉio sian koron. Ne, en esperanto kaj ĝia praktika flanko li ne vidis la celon, sed nur rimedon al intergenta kaj interpopola repacigo, kiun li esperis atingi per neŭtrala al neniuj popolo apartenanta lingvo. Lia celo estis multe pli alta ol la profito, kiun tiros komercistoj kaj foiroj el la tutmonda disvastiĝo de esperanto. Amo al la homaro kaj la arda deziro faligi la murojn, kiujn starigis inter la popoloj la reciproka nekompreneo kaj malamo, jen lia celo, jen la fonto, el kiu li ĉerpis la forton al la superhoma laboro. Amo al la

homaro, jen la risorto, kiu lin pelis antaŭen, kiu faris el lia tuta vivo longan ĉenon da suferoj, kies lasta ĉenero estis lia morto. Sen tiu ĉi estimo kaj amo al la homaro Zamenhof estus neniam fariĝinta aŭtoro de la lingvo esperanto: ĉar ĝuste tiu ĉi amo estis la semo, el kiu la lingvo ekĝermis. Li ne pensis pri profito. Lia koro revis, ke la popoloj fartos en konsento unu grandan rondon familian, ne profiton, sed sanktan harmonion promesas lia lingvo al la mond' eterne militanta. Tre estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj, karaj amikoj! Ni do havas du difinojn de l' esperantismo: unu Zamenhofan neoficialan, nian himnon kaj unu oficialan, la Bulonjan Deklaracion. Kiu el ili ludis ĝis nun kaj ludos estonte la gvidan rolon? Tiun ĉi demandon respondu viaj koro kaj konscienco! Sed unu fakto estas nerefutebla: Sen la unua esperanto ne estus ĝisvivinta la duan!

Jes, la Bulonja Deklaracio estis necesa, por ke ni ne respondu por ĉiu esperanton hazarde lerninta trompisto kaj fiulo. Sed kial vi, amikoj lernis esperanton kaj restis fidelaj al nia movado? Dum miaj radio-kursoj mi ricevadis multajn leterojn de miaj aŭskultantoj kaj preskaŭ ĉiuj skribis pri la alta ideo, kiun esperanto promesas efektiviĝi. Nenecesas precize difini tiun ĉi ideon, vi ĉiuj sentas ĝin. Kiam mi pensas pri mia esperantistiĝo, mi ĉiam devas pensi pri konata fizika fenomeno: kiam oni ludas violonon, alia violono eksonas per la sama tono, sed nur tiam, se ili ambaŭ estas same agorditaj. Jen la klarigo de l' fakto, ke homo allogita per la praktika flanko de esperanto estas odinare la unua, kiu ĝin forlasas. Nur tiu esperantisto restas fidela, kies koro, aŭdante la fortan vokon, harmonie eksonis kun la eterne viva koro de nia majstro. Ni, ŝajnas al mi, tro persiste parolas pri la facileco de nia lingvo kaj la homoj enuiĝas, ĉar ĉiu infano jam aŭdis, ke esperanto estas lingvo facila. Ni ekkantu, ĥore ni ekkantu, ke tra la mondo iras forta voko kaj la orelo de l'mondo ekaŭskultos, ĉar malgraŭ ĉio ne la cerbo sed la koro decidis finfine pri ĉiu kultura ideo kaj ĝia sorto.

Jes, ni akcentu, propagandante esperanton, ĝian facilecon kaj utilecon, sed ni samtempe forte substreku ĝian pacigan forton inter la gentoj kaj popoloj. Sed por ke nia aserto ne estu vortoj malplenaj, ni mem devas antaŭ ĉio pruvi ĝian verecon. Tial mi ĝoje aplaŭdas la taskon plenumotan de tiu ĉi kongreso: fondi esperanto-asocion en ĉ.l. kaj mi elkore deziras, ke la nova asocio fariĝu agrabla hejmo kaj komuna laborejo al samideanoj apartenantaj al ĉiuj popoloj, kiuj loĝas en tiu ĉi ŝtato.

Malgraŭ la ondoj de l'minacanta milito, ni kun miro kaj ĝojo povas konstati, ke tamen la plej multaj kulturaj popoloj deziras la pacon kaj abomenas la militon. Tiujn ĉi pacemajn popolojn ni gajnos por esperanto nur tiam, se ni pruvos al ili la pacigan forton de nia lingvo. Kaj nur tiam plenumos la lingvo esperanto sian destinon, kiun donis al ĝi ĝia kreinto. La tutmonda solidareco kaj kunlaboro de la esperantistaro estas nia plej elokventa kaj plej konvinkiga argumento. Ni uzu ĝin kaj esperanto venkos.

*Mi havas la honoron reprezenti la Tutmondan Asocion de Geinstruistoj esperantistaj. En ĝia nomo mi salutas la kongreson kaj deziras al ĝi plenan sukceson. Mi uzas tiun ĉi okazon por atentigi al nia asocio. Speciale mi atentigas la ĉeestantajn kolegojn-instruistojn kaj profesorojn kaj invitas ilin al kunlaboro, ĉar nur per forta instruista asocio ni konkeros la lernejon kaj per ĝi la mondon.*